
# KIEL DIRI TRIMANIERE

## (3-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**



Tiuj homoj,
kiuj emas
konsumi, kuris
rapide al
magazeno, por
profiti rabat-
kampanjon.

Tiuj
konsumemuloj
rapidis al
butikego, kie
estis rabat-
vendado.

Tiu aĉetema
homamaso
rapidkuris en
ĉenmagazenon,
por trafi
malaltigon de
prezoj.




Tiu magazeno estas de mi. Tio volas diri, ke mi havas entreprenon.

Tiu butikego apartenas al mi. Per aliaj vortoj, mi posedas firmaon.

Tiu vendejego estas mia. Tio signifas, ke mi estas entreprenisto.



Li aĉetos tiun aŭtomobilon, ĉar li posedas monon. Tiu aŭtomobilo estos de li.

Li akiros per mono tiun aŭton, ĉar lia financo favoras. Ĝi apartenos al li.

Li havos tiun veturilon, ĉar li havas monon. Ĝi estos lia.



JUPOJ





BLUZOJ

Karmela surprovis tiujn vestojn. Ŝajnas, ke ŝi ŝatis ilin. Ĉu ili apartenos al ŝi?

Karmela provis sur si tiun kompleton (jupon kun bluzo). Ŝajne ŝi aprobis ĝin. Ĉu ĝi estos ŝia?

Ŝi surprove vestis tiujn du vestaĵojn. Laŭŝajne ili estas ŝatataj de ŝi. Ĉu ili estos ŝiaj?



Tiu hundeto estas adoptita de tiuj du homoj. Nun ĝiaj gemastroj estas ili.

Tiun beston adoptis ili. De nun ĝi estos la hejmbesto de siaj geposedantoj.

Tiuj gejunuloj adoptis tiun hundidon. De nun antaŭen ĝi estas ilia dorlotbesto.



Tiuj gegladantoj gladas per gladiloj. Ili (la gladiloj) estas aĉetitaj de ili (la gegladantoj). Ili apartenas al ili.

Ili gladas per ili. Ili (la gegladantoj) akiris ilin per mono. La gladiloj estas iliaj.

Ili estas uzataj de ili. Ili (la gladiloj) estas aĉetitaj de ili (la gegladantoj). Ili estas iliaj.



Bruna gajnis tiun ventolilon de sia edzo.

Ŝi ventolas sin, ĉar estas tre varme.

La edzo de Bruna donacis al ŝi tiun ventolilon. Ŝi estas ventolanta sin pro tio, ke multe varmas.

Tiu ventolilo estas donacita al Bruna de ŝia edzo. Ĝi ventolas sian posedantinon, ĉar la vetero estas tre varma.

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

